N-ro 3/2020
32a jaro (2a periodo)

# inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktis: Vidar B. Skratting – Muntis: jpa



La ĉi-numera *Inter Ni Dirite* estas iom pli serioza ol kutime. Sed kelkfoje oni devas ankaŭ paroli serioze pri aferoj kiuj tuŝas la junulan vivon, de kiu sociaj medioj iĝis tre granda parto. Se la artikolo estas tro serioza por vi, vidu rekte al Ponduso!

## Sociaj Medioj – ĉu danĝeraj?

Sociaj medioj ege ŝanĝis la mondon dum la lastaj dek jaroj, en manieroj kiel ni ankoraŭ ne komprenas. Sed nune pli kaj pli ekkomprenas ke ili estas treege pli problemaj ol ni pensis. Unu problemo estas ke ni elspezas multe da tempo fari "nenion" je la sociaj medioj. Sed la perdo de tempo ne estas la plej granda problemo kiun ni alfrontas, verŝajne kompare kun la aliaj, ĝi eĉ ne estas *granda* problemo! Ni komencu ekde la komenco …

Rakontiĝis al ni ke la sociaj medioj pliboniĝos nian mondan socion, ĉar per ili oni povas pli facili komuniki, amikiĝi, kaj krei komprenadon inter diversaj klasoj, popoloj kaj nacioj. Bedaŭrinde, la fakta evoluo de la fenomeno indikas ke okazis la malo.

Sendube, la unuaj spertoj de sociaj medioj favoris la optimistojn. Certe plifaciliĝis komunikado, kaj ĉiuj el ni subite spertis la ĝojon




© Øverli. distr. strandoverli@yahoo.com

retrovi malnovajn amikojn de la lernejo, aŭ teni la kontakton kun la amikoj kiujn vi trafis dum la someraj ferioj en suda Eŭropo. Pli grave, la sociaj medioj ankaŭ ŝajnis kontribui pozitive al demokratiaj agadoj en la tuta mondo. Pro-demokratiaj insurekcioj en diversaj diktaturaj landoj nomiĝis ekzemple la “twitter”-revolucio kaj la “facebook”-revolucio. Eĉ Esperanton helpis la novaj retaj instrumentoj – neniam pasinte estis pli facile trovi kaj paroli kun geesperantistoj enlande kaj eksterlande, kio treege helpis kaj motivis min persone lerni la lingvon. Do, ŝajnis ke la sociaj medioj vere estis en la proceso krei pli bonan mondon por ĉiuj.



Sed iom post iom ĉio ŝanĝiĝis. Eĉ se kelkaj internuloj en la komputila industrio frue provis averti nin pri la danĝeroj de sociaj medioj, la plejmulto el ni tute ne komprenis la problemon ĝis 2016. Tiam malkovriĝis ke Facebook uziĝas por fari tre kompleksajn, kaj personspesifikajn politikajn reklamojn, uzante la vastan kolekton de personaj informoj kiujn kolektis ĝi tra la jaroj, kiu probable influis la tre disputan usonan baloton en tiu jaro. Tiun elekton flanken – la pli granda demando estas kaj estis – ĉu ni vere volas ke la sociaj medioj sciu ĉion pri ni? Kaj poste uzi tiun informojn pri ni por manipuli kiel ni pensas?

Tio ne estas difekto de la sociaj medioj, sed trajto. La komerca ideo de la socia medio kompanioj, estas scii ĉion pri ni, kaj poste manipuli ĝin. Se vi kredas ke vi ne povas manipuliĝi… vi malpravas. Se vi, aŭ iu alia, ne povus manipuliĝi, la socia medio kompanioj ne gajnus monon. Sed ili ja gajnas monon – multe da mono!

Ekzistas eĉ pli granda problemo ol tio, kiu estas la problemo de la algoritmoj kiuj frenezigas nin. Ju pli da tempo vi elspezas ĉe iliaj platformoj, des pli da mono ili gajnas. Kaj la algoritmoj personigas ĉion kion vi vidas je viaj sociaj medioj por igi vin elspezi pli da tempon ĉe ili. Estas la sama metodo kiu uziĝas ĉe Twitter, Facebook, YouTube TikTok. Kiam la algoritmoj tage testiĝas kaj perfektiĝas je miliardoj de personoj, la algoritmoj pliboniĝas rapide. Kaj bedaŭrinde, la plej bona metodo por kapti vian atenton estas kolerigi vin. Ili montras al vi la enhavon kaj novaĵojn, politikajn aŭ aliajn, kiuj povas kolerigi vin, ĉar tio signifas ke vi elspezos pli da tempo ĉe la platformo. Kaj vi neniam vidas la saman informon kiel aliaj. La plej spertaj psikologoj kaj programistoj en la mondo kreis la algoritmoj npor certigi ke vi koleriĝas. Iom post iom, ĉiuj el ni sinkas malsupren en nian propran vezik-eton, kie oni ne vidas la saman mondon kaj la personon flanke de vi. Aldone, ambaŭ manĝigas gradon post grado pli ekstreman, kolerigan enhavon.

Eble vi iam miris kiel kaj kial la mondo ŝajne freneziĝis. Aŭ kial via amiko, kun kiu vi longtempe ne parolis, subite aperas kiel frenezulo kun tre strangaj opinioj. Aŭ kial viaj amikoj nun pensas la samon pri vi? Ĉi tio estas la respondo – la tutan mondon kaptis fortegoj kiujn oni ne komprenas, kaj kiuj nur povas gajni monon per frenezigi ĉiujn e ni.

Kio devas esti nia respondo? La plej bona estas eble “forigu viajn sociamedio-kontojn nun”, kiu skribis la “komputil-filozofo” Jaron Lanier en la libro kun (preskaŭ) la sama